

SANKTA NAIVECO

Artikolo publikigita en la revuo Adista n. 8/ 2011
(Mt. 6, 24-34)

Preskaŭ nin tenerigas la simplanimeco kaj la naiveco de Jesuo. Oni ĝuste dirus ke li ŝajnas alveni el alia mondo. Alikaze kiel li estus povinta deklari ke ne eblas "servi al Dio kaj al Mamono", ĉar oni ne povas esti sklavo por du sinjoroj"?! (Mt.6, 24).

En la evangelio laŭ Sankta Luko, Jesuo eĉ ne havas la tempon por tion deklari kiam ĉe liaj ŝultroj oni jam aŭdas mokridegon: temas pri la fariseoj, la piaj, devotaj, observantaj homoj, la ĉikanemaj piuloj al ĉiu eĉ plej eta devo "kiuj estis monavidaj" kaj kiuj aŭdinte la asertojn de Jesuo "lin mokis"(Lk. 16, 14).

Sankta naiveco estas tiu de la Kristo. Sed kiel ne eblas servi al Dio kaj al Mamono?

Ekde ĉiam la religiuloj opiniis povi servi al Dio kaj al Mamono (aramea vorto kiu indikas la personan riĉaĵon sur kiu baziĝas la homa sekureco kaj konfido), psalmi kaj kalkuli la monon, eĉ ili faris ĝuste el ilia Sinjoro la privilegian ilon por amasigi posedaĵojn kaj riĉaĵojn. Ĉu ne estas ĝuste la skribistoj tiuj kiuj "formanĝas la domojn de vidvinoj, kaj por preteksto longe preĝas"? (Mk. 12, 40). Skribistoj al kiuj Jesuo kunigas iliajn kunulojn, la fariseojn, kiuj estas tiom ekzemplodonaj kaj senmakulaj ekstere, kiom "plenaj de rabado" interne (Mt.23,25).

Jesuo eraris, oni povas tre bone servi al Dio kaj al la riĉaĵo, al la Sinjoro kaj al profito. Estas senutile ke Jesuo sin referencu al denunco kiun la Sinjoro jam faris pere de la profetoj, por sciigi al ni ke al Li ne interesas la sanktoferoj al Li adresitaj, sed la bonfarado al la homoj (Hoŝ 6, 6; Mt. 9, 13; 12, 7) Per la mizerikordo oni ne sin vivtenas, per la buĉferoj donacitaj de la fideluloj oni jes, ja sin vivtenas, kaj tiam oni devas agi tiel ke tiuj fideluloj ĉiam pli oferu, ĝuste al Dio.

Vane la Sinjoro pere de la profetoj evidentigis la avidon de la nesatigeblaj pastroj kiuj "Per la pekoj de Mia popolo ili sin nutras, kaj al ĝia malpieco strebas ilia animo." (Hoŝ. 4, 8) Senutile la paŝtistoj de la popolo, kiuj, kaj estas la Sinjoro mem kiu tion diras, "ili nenion komprenas, ili estis abrupte alparolataj kiel "hundoj avidaj, kiuj ne povas satiĝi" (Jes. 56, 11).

La allogo de Mamono estas nerezistebla, al ĝi ĉiuj cedas, neniu kapablas kontraŭstari la tenton de la mono, kaj se iuj tion faras ili ne agas pro sia digno, sed nur ĉar oni ne oferis al ili sufiĉe da mono.

Tamen fronte al tiu ĉi neneigebla evidenteco, antaŭ la nerezistebla allogo de la mono, Jesuo ne ekstraktas aŭ kompromisas, kaj Li ne hezitas proponi sian mesaĝon sendube kontraŭfluan kaj malavantaĝan, asertante ke "pli feliĉe estas doni ol ricevi" (Agoj 20, 35).

Estas vere, mamono, la havaĵo ŝajnas proponi nedisputeblajn avantaĝojn kaj por ĝin atingi kaj amasigi la homoj estas pretaj al ĉiuj ĝenoj, al rezigno pri sia honorindeco kaj eĉ al subpremo de alies digno.

Sed poste? Al kio utilas, admonas Jesuo, "kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus sian animon?"(Mt. 16, 26). Dum la aniĝo al la Sinjoro iom post iom liberigas ĉiam pli la homojn, la akcepto de mamono faras ilin sklavoj, kiuj senlace laboras pro sia ruiniĝo mem. Trompitaj de mamono la homoj opinias havi riĉaĵon, anstataŭe ili estas posedataj de ĝi. Ĉu la pruvo? Ili ne sukcesas sin malembarasi je ĝi.

Jesuo en la evangelioj sukcesis purigi la leprulojn, kaj liberigi la demonposedatajn homojn. La ununura fiasko okazis kun la riĉulo (Mt. 19, 16-22). La riĉulo estas posedata de la demono de la mono, kaj la pruvo estas ke tiu ĉi ulo ne disponas pri sia riĉaĵo sed ĝi disponas pri li, li estas posedata de la samaj bonaĵoj kiujn li opinias posedi, rulfalinte en elmemiĝon kiu igas lin neatakebla de la dia agado.

Pro tio en la komunumo de Jesuo ne estas loko por la riĉuloj (Mt.19, 24), sed nur por la sinjoroj. La riĉulo estas tiu kiu havas kaj ĉion retenas por si mem. La sinjoro estas tiu kiu donacas kaj kundividas kun la aliuloj, kaj nur tiu ĉi sinteno esprimas la profundan fidon je tiu Patro kiu donacas la vivon kaj prizorgas la bonon kaj la bonfarton de la aliuloj. La regno anoncita de Jesuo fariĝas realaĵo kiam anstataŭ ol mamono oni elektas la Patron kaj anstataŭ la havaĵo oni malkovras la ĝojon donaci.

Artikolo verkita de frato Alberto Maggi.